

Esperanta Numismatiko



Jarkolekto 12 - Numero 4



ENHAVOTABELO

de oktobro 2025

Titolpaĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5

XVIIIa S.A.T. – KONGRESO 1938

Kilián, György (1907-1943)

Via hispana nacia kongreso Madrido 1926

Jubilea plaketo “Paco kaj Justeco” 1937-1962

Spikumaĵoj & suplementoj	10
Por spuremuloj!	12
Aspektoj de numismatiko: Ekslibriso per reliefpreso	13
Valormarkoj & valorbiletoj: Biletligaĵo por kapitalgarantio	14
Medalistoj: 40 Ruben Nutels (°1952)	15
Historiaj aspektoj: IXa S.A.T. - Kongreso en Lepsiko 1929	17
Terminaro: Alfabeta listo (43)	18
Numismatika Forumo: Tiel kaj tial mono funkcias (2)	19
El la gazetaro: Artikoloj el “Belga Esperantisto”	20
Retpoŝto	21
Anoncoj & eventoj	29

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: ena.frali.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*“Se savi la ekologian sistemon estus multe pli profitodona ol detrui ĝin, niaj entreprenistoj jam de longe estus solvintaj la plimulton de la problemoj”
(BB)*



Kiu hazarde jam legis dankvortojn sub niaj artikoloj aŭ trafolumis nian rubrikon “Retpoŝto”, probable jam konstatis, ke la nombro de kunlaborantoj, do de libervolaj redaktoroj, stabilas, eĉ kreskas. Ekde la lanĉo de nia revuo, antaŭ pli ol unu jardeko, ni stimulas kaj instigas niajn legantojn sendi al ni artikolojn, novaĵojn, bildojn, fotojn kaj alispecajn informojn. Jen do vivanta arkiveto!

En la belga provinca urbeto Diest la nova, vera arkivejo IEspA, aĉetita en 2024, nun plene funkcias. Tio ebligas al redaktoroj, studentoj kaj aliaj interesuloj peti informojn, distance aŭ surloke. Konataj projektoj, kiel ENA, tre regule petas aŭ ricevas informojn kaj klarigojn pri objekto aŭ teksto, kiuj finfine revidas la lumon post longa dormo kaj sekve de senĉesa antaŭa ordigo kaj studado en la nova arkivejo. Ne mirigas nian redakcion regule ricevi neatenditan mesaĝon pri nekonataj moneroj, medaloj ktp. Do, kio malhelpus vin flankentiri la kurtenon de tiu tute nova groto de Ali Baba? Tiel ekstartas la plej interesaj ekspedicioj, ĉu ne? Viaj komentoj kaj vi mem, el kiu ajn lando aŭ surloke, ĉe IEspA estas ege bonvenaj! Do, bonvolu kontakti la sidejon, se necese aŭ nur pro scivolemo! Se vi aliflanke povus kompletigi la jam riĉan arkivon per iu kluba aŭ via persona arkiv(et)o, ne hezitu kontakti la arkivon en Diest! Evidente ankaŭ mecenatoj, malgrandaj kaj grandaj, povas finance subteni la projekton!!!



Internacia Esperanto-Arkivo vzw
Hasseltsestraat 26, 3290 Diest (Belgio)

www.iespa.eu, info@iespa.eu
BE 0761967959
(iban) BE06 7310 5180 2722
(bic) KREDBEBB



Post ĉi gravega mesaĝo de la dankema, unika fakgrupo numismatika, ni invitas vin, karaj gelegantoj, malkovri kiel kutime sur la venontaj paĝoj la “novajn” medalojn, kiujn ni montras kaj priskribas por vi, por ke vi povu denove malkovri, kiom riĉa kaj pristudinda estas la trezoro de numismatikaĵoj, kiuj tro longtempe troviĝis en la ombro de la esperanta historio. Krome la redakcio senĉese laboradas, por prepari la eldonon de la unuaj numismatikaj katalogo kaj terminaro... do iom da pacienco, ni petas!

Bert

Internacia Esperanto- Arkivo

La asocio estis fondita en la 22-a de januaro 2021



Internacia Esperanto-Arkivo, mallonge IEspA, celas kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblajn librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn kaj objektojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj).

Tiu ĉi arkivo celas konservadon, kiel heredaĵo por nelimigita tempodaŭro.

La fondintoj kaj administrantoj



Roland Rotsaert



Marc Vanden Bempt



Bert Boon

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo C2 – Esperanto-unuflankaj medaloj

XVIIIa S.A.T. - KONGRESO 1938



Lando: Belgio
Metalo: kupro
Mezuroj: 46 x 49 mm
Jaro: 1938

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 8 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 1 mm

Averso:

supre: verda, emajlita stelo kun, parte en ĝi, flamo de torĉo
ĉirkaŭe en rando de kvazaŭa stampo: "XVIII^a-S.A.T. KONGRESO"
centre-fone: stiligita terglobo
centre: du manoj montrante tenantaj torĉon
sube: arketo kun surskriboj: "BRUSELO 1938 ESPERANTO"

Reverso:

Supre-meze: nomo de la fabrikinto (?): R. MARTIN
sube-maldekstre: adreso de la firmao (?): R(ue).DRAPEAU 25
sube-dekstre: BRUXELLES (ĉefurbo de Belgio)

Rimarko 1:

S.A.T. = Sennacieca Asocio Tutmonda

Rimarko 2:

mezuroj detale mezuritaj kaj konstatitaj de Marc Vanden Bempt: "Pentagramo kun lateroj de 29-30 mm. La du subaj lateroj oblikvaj mezuras 29 mm, la tri aliaj 30 mm. Alteco 46 mm, larĝeco 49 mm.

Rimarko 3:

reverse spuroj de iama krome fiksita pinglo, por eventuale uzi ĝin kiel insignon. Tamen origine medalo kvinangula, brakateate stampita.



Kilián, György estis profesia seruristo kaj junulara gvidanto de la subtera komunista partio en Hungario.

Li lernis Esperanton kaj membriĝis en diversaj, ofte malpermesitaj, Esperanto-organizaĵoj, kiel S.A.T. kaj Internacio de Proleta Esperantistaro. Aktive li partoprenis S.A.T.-kongreson en Lejpcigo kaj korespondadis kun bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj.

Ekde 1927 li laboris en *Egyesült Izzólámpa és Villamossági Rt.* (poste konata kiel *Tungsram*), kie li ankaŭ estis redaktoro de la komunista semajna revuo “Vörös Tungsram”.

En la tridekaj jaroj li iĝis konata kaj fama en la komunista movado. La “Feraj junaj laboristoj” sendis lin kiel delegiton al la Komunista Kongreso de junaj laboristoj en Aŭstrio.

Sekve li studis en partia lernejo en Moskvo kaj reveninte hejmen li iĝis redaktoro de la komunista revuo “Juna Proleta”. Li estis arestita (kune kun Imre Sallai kaj Sándor Fürst) kaj kondamnita je unu jaro en malliberejo.



En 1941 li atingis Odeson ĝuste kiam okazis la nazia atako kontraŭ Sovetunio. Li aliĝis kiel volontulo al la soveta armeo kaj dum aŭ post paraŝutista enbataligo en 1943 li senspure malaperis, oriente de Varsovio.

Ne nur urbopartoj, stratoj kaj lernejoj ricevis poste lian nomon. Ĝis 1990 sub la patronado de la defenda kaj internafera ministerioj ekzistis la Kilián Batalista Klubo (KHT), kie la montratan medalon ricevis la gajnintoj de sportkonkursoj.



Tipo C4 – Ne-Esperanto-medaloj rilate al Esperanto

Kilián, György (1907- 1943)



Lando: Hungario

Metaloj: bronzo arĝentita

Diametro: 50 mm

Jaro: 1956

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

centre: kapo de Kilián, György

ĉirkaŭskribo (+ elhungarigita): “★ KILIÁN GYÖRGY SEREGSZEMLE ★ 1956”
(= “★KILIÁN GYÖRGY MILITA PARADO ★ 1956”)

Reverso:

supre: steleto

ĉirkaŭe: laŭrokrono

centre:



= “Pro la rezulto atingita en la regiona finalo de la milita parado/revizio”

Tipo A3 – Esperanto-medaloj kun ne-esperanta(j) aldono(j)

Via hispana nacia kongreso Madrido 1926



Lando: Hispanio

Kvanto: serĉata

Metaloj: kupro-nikelo

Pezo: 5,65 g

Mezuroj: 31,5 x 20 mm

Medalista: *serĉata*

Jaro: 1926

Diko: 1 mm

Averso:

pinte: krono kun pendigileto

supre-meze: antikva blazono de la urbo Madrido

ambaŭflanke: laŭrobranĉeto kun sube Esperanto-steleto

meze-sube: surskribo “6^o CONGRESO NACIONAL DE • ESPERANTO•” (hispanlingve)

Rimarko1:

en Madrido esperantaj kongresoj okazis en 1926, 1932, 1957, 1973, 1980, 1987 kaj 2018

Rimarko 2:

formo de la medalo: vertikala ovalo

Rimarko 3:

la inkluziva pendigileto reverse indikas, ke la medaleto estis uzita kiel (kongresa) insigno. Eble mankas rubandeto kaj / aŭ fiboleta.

Rimarko 4:

iaa blazono de Madrido



Tipo C9 - Plaketoj kaj medalonoj

Jubilea plaketo “Paco kaj Justeco” 1937-1962



Lando: Belgio

Kvanto: serĉata

Materialo: ceramiko

Pezo: 1 165 g

Diametro: 220 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1962

Diko: 25 mm

Averso:

rande: jubilea glorkrono ĉirkaŭ blanka fono

meze: granda verda stelo kun “PACO KAJ JUSTECO”

meze - fronte: silueto de la belfrida turo en la urbo Bruĝo



Rimarko 1:

ceramiko: rezulto de tekniko por baki argilteron aŭ similan materialon kaj elfari potojn, vazojn, medalonojn ktp.

Rimarko 2:


belfrido: gvata, alarma turo el la Mezepoko

Rimarko 3:

“Paco kaj Justeco”: nomo de Esperanto-grupo, fondita en 1937 en la belga urbo Bruĝo.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

A) Ludoviko, la antaŭ nelonge forpasinta nepo de Zamenhof, kiel infano savita el nazia koncentrejo, montras ekzempleron de la medalo de Toleremo



B) Du junuloj entuziasme montras polan jubilean medalon el 1987



C) Variantoj de murmedalo el Herzberg am Harz



En jk.3 nr-o 1, p.9 ni jam detale priskribis la murmedalon kun busto de Zamenhof, t.e. la polan version, kun indikoj de la jaroj de la zamenhofa naskiĝo kaj forpaso.

Kiam Marc Vanden Bempt kaj mi en 2023 vizitis la Esperanto-Centron de Herzberg am Harz, “La Esperanta Urbo” en Germanio, Sofio kaj Petro permesis al mi foti la medalojn kaj plaketojn kiuj brilas sur la muroj de la Esperanto-domo.

Subite trafis min, ke murmedalo pri Zamenhof ekzistas en du variantoj, unuflanke kun la antaŭnomo de Zamenhof en la pola (LUDWIK), aliflanke en esperanta versio (LUDOVIKO).

Rimarkinde estas, ke la pola versio troviĝas ankaŭ en la sama domo kiel unuflanka medalo, kun identigaj rekonmarkoj kiel la “pola” murmedalo, en bronzo sur ligna, ronda tabulo, tamen probable en gipso aŭ keramiko.

Teorie ĝi povus do esti rezulto de la kreiva fazo antaŭ la malpligrandigo de la gipsa modelo aŭ eĉ provmedalo por kontroli la proceson, ĉar la surfaco de la “modelo” iom tro brilas por esti gipsa... Ne ĉiuj enigmoj ja povas tuj esti solvataj!

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. HELPU NIN!

43a enigmo

ESPERANTA INTERNACIA PLAKETO - MEDALIONO (por ornami aŭtomobilojn)



?



44a enigmo

ENIGMA, UNUFLANKA, NEREGULA DISKO (EL ARKIVITA ESPERANTO-KOLEKTO!)

KUN STELO KAJ RADIOJ



?




ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Ekslibriso per reliefpresa tekniko



Kreita per ĉina inko de iu Piet Verlinden en Antverpeno (Belgio), la 1an de novembro 1931.



Edward Symoens (1915-1995). Honora membro de UEA ekde 1993. Vidu ankaŭ: Vikipedion!

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Biletligiĝo por kapitalgarantio de Universalaj Kongresoj de UEA

Jen kiu restas de UEA-biletligiĝo de iam antaŭ la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento. En 1981-1982 probable denove uzita samcele okaze de la “*Internacia Junulara Kongreso*” en la belga urbo Loven. La verda, kongresa stampo de la lovena klubo *Esperanto 2000*, permane stampita, troviĝas alterne ekde la bileto 1162. La biletaro restas numerita nur de 1161 ĝis 1200.

№ 1161

-a Universala Kongreso de Esperanto
GARANTIA KAPITALO

S-ro/S-ino/F-ino _____
Adreso _____

deklaras ke li/ŝi estas pruta garantiĝi por la _____-a Universala Kongreso de Esperanto la sumon de 25.— ned.gld. aŭ egalvaloro. La garantiita sumo aŭ procento, laŭ proporcio, estos pagita al L.K.K. nur en okazo de deficito.

Loko kaj dato _____ Subskribo _____

Art. 28 de la Kongresa Regularo tekstas: “En la komenco de la kongresa laboro L.K.K. starigas Garantiitan Kapitalon por kovri eventualan deficiton. La Garantiita Kapitalo estu minimume 3000.— ned.gld.



MEDALISTOJ

Ruben Nutels (1952)



Pri ĉiu ajn israela artisto novaĵoj kaj datumoj estas sufiĉe maloftaj en la Reto. Pri Nutels, kun la helpo de nia israela UEA-delegito Joshua Tilleman, ni scias, ke li estas pentristo, grafika dezajnisto kaj finstudinto de la “Bezalel Akademio pri Arto kaj Dezajno”.

Kiel gravuristo-dezajnisto li montris sian talenton i.a. per la kreado de novaj israelaj moneroj po 2 kaj 10 ŝekeloj kaj de esperanta jubilea medalo kun busto de Zamenhof en oro, arĝento kaj bronzo.



Lia talento kiel medalisto estas kvazaŭ skulpteca kaj tial li nacie kaj internacie gajnis multajn premiojn kaj distingojn.



Siajn pentraĵojn li realigas per akrilo, krajono, karbokrajono kaj ĉina inko (tuŝo) sur kanvason. Tiu stilo montras la streĉiĝon inter la realismo kaj la kunteksto de surrealismo, inter emocio kaj impulso, inter realismo kaj fikcio, inter logiko kaj fantazio. Tiurilate en la pentraĵoj abundas korpaj elementoj, kvazaŭ tuŝeblaj.

Ruben Nutels ankaŭ estas entuziasmulo pri aŭtoj kaj motorkonkursoj. Tial li skizas kaj konstruas aŭtomobilmodelojn. Lia celo estas montri per desegnaĵoj la belecon kaj la dinamikon de kineto.



La redakcio tutkore dankas samideanon Joshua Tilleman el Israelo pro liaj interesegaj informoj!



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIUJO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12^e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20^e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerner

POSTKONGRESAJ PRIPENSOJ

Varmaj estis la kongresaj tagoj! Tre varmaj... Nur la ĉeestintoj povas kompreni la gustan kaj tutan signifon de tiuj vortoj. La atmosfero estis fulmema. Pendis alte en la aero laj apenaŭ videblaj nuboj minacaj. Oni antaŭsentis ian fulmotondron. Kaj tio neniel estas miriga, por tiu, kiu estas informita pri la konsisto de la elementoj, kiuj konsistigas la SAT-anaron.

Ĉiu scias, ke plej akraj politikaj bataloj ekzistas inter la diversaj tendencoj de la laborista movado. La partiaj gazetoj estas kvazaŭ plenplenaj je eksplodigaj polemikaĵoj kaj venenaj gasoj. Ties legantaro estas saturita per bolantaj pasioj ĉiam pretaj elspruci. Se la energio kaj municio elspeziĝas en la intertendencata batalo estus direktataj sole kontraŭ la nuna malĝusta sociordo, estas duba, ĉu ties profitantoj povus daŭrigi sian parazitivan vivon. Sed pri tio nun ne estas la temo. Fakte estas, ke la anoj de la diversaj tendencoj kaj partioj kelkfoje rilatas inter si tre neĝentile, eĉ malamikie. Sekve estas tute nature, ke la ĉeesto en sama ĉambro de 662 personoj ŝargitaj de malsama elektro kreas tian fulmeman atmosferon.

Se fulmo detruas, okazas ankaŭ iafioje, ke ĝi nur purigas la atmosferon. Tiel okazis en Leipzig, en la impone bela salonego de la "Volkshaus" (Popoldomo).

La ĉi poste presita Rezolucio, kiu estis akceptata unuanime, signalas revenon al pura, sana stato.

Dum la interkongresa jaro ensteliĝis polemikoj sur la paĝoj de nia gazeto. La Legantaro certe ĝojos de la konstato, ke "S-ulo" tute puriĝis je malicaĵoj kaj incitaĵoj.

Sed kiel do povas okazi, ke en la esperanta laborista movado la konfliktoj ĉiam solviĝas kontentige, ĉiam formalaperas la nigra fantomo pri skismo? Bele respondi al tiu demando K-do von der Held, kiu je la nomo de la Kongresprezidentaro faris la finparolon. En la

Se la atmosfero refariĝis pura en SAT, se ni evitis la skisman malsanon, kiu tiom malfortigas la laboristan movadon. Ĉu eble ne estas pro tio, ke ni ĉiuj, pli malpli konscie, estas unue esperantistoj kaj nur due partianoj? Mi ne provas respondi al tiu demando; sed en ĉi tiu okazo ni neniam konfesu tiom en nacia lingvo...



Mi dezirus diri multon pri la bonaj aranĝoj de la Kongresa Komitato. Ĝia tasko estis grandega, se oni prezentas al si, ke aliĝis 1102 kongresanoj kaj ĉeestis 662. La organizkapablo de niaj K-doĵ venkis ĉiujn malfacilojn. La tuta SAT-anaro danku al ili kaj memoru pri ilia granda merito.

Sed oni ankaŭ povas laŭde menci, ke la sama granda kvanto da ĉeestantoj partoprenis de la komenco ĝis la fino la kongresajn kunsidojn. Tio montras, ke niaj K-doĵ konsciis pri sia tasko kaj ne venis al Leipzig por alia celo ol labori en la servo de nia movado. E. L.

REZOLUCIO

La Kongreso

1. konstatinte unuflanke, ke la eldono de "La Laborista Esperantismo" estis farita laŭ maniero, kiu povis kredigi, ke tiu verketo celis tiri la oficiala programo de nia Asocio; andinte la konfeson de la Direktorio, ke tio estis "mispaŝo";

konstatinte duflanke, ke

a) la paragrafo unua de la statuto plene difinas la celojn kaj taskojn de SAT;

b) ke la 8. SAT-Kongreso bone difinis la rolon de SAT, dirinte ke ĝi ne estas politika, sed nur kleriga, eduka, kultura

esperanta laborista movado regas la "interna ideo" — proleta. Sendube tiu unuiga ideo ne estas la sama kiel tiu de Zamenhof. Tamen ĝi estas el la sama speco: ĝi konsistas el sindonemo al la afero, el espero, el forta sento pri justo kaj bono, pri volo kaj decido batali unuece per esperanto por la liberigo de nia klaso el sub la jugo de l' kapitalismo.

En SAT ja nun ankoraŭ regas tia proleta "interna ideo". Nia movado kreskas kaj fortiĝas dank' al la sindono kaj sinforĝeso de miloj da K-doĵ, dissemitaj en ĉiuj regionoj de l' mondo.

Ni devas zorgi, ke tia stato neniam senfortiĝu; ni devas ĝin flegi, neniam forgesante, ke tio estas kondiĉo sine qua non, de speciala speco, por la bono kaj prospero de nia helpe liberiga, eduka, kultura SAT-entrepreno.

HISTORIAJ ASPEKTOJ

IXa S.A.T.-Kongreso en Lipsiko 1929



Teksita insigno, metita sur stampita ferladaĵo kun horizontala pinglo. Fabrikis DR.R. MORISSE & CO, ELBERFELD (apud Wuppertal, Germanio). Mezuroj: 44 x 36 mm.

Jen eksterordinara, sed ne necese rarega insigno (ĉeestis en la Kongreso eĉ 662 homoj el 22 landoj (vidu foton sube!). Vendita objekto en aktuala rusa aŭkcio, kun interesa familia rakonteto far la nekonata vendisto mem:

“La insignon posedis svislanda ĵurnalisto (poste famega svisa diplomato) René Naville (1905-1978), kiu en 1929-1930 kiel staĝanto-korespondanto de ĝeneva gazeto laboris en Tifliso (Georgio - tiam soveta). René amindumis mian 19-jaran (estontan) avinon Margarita. Li faris edziĝopeton al ŝi kaj volis akompani ŝin al Eŭropo, sed ŝi rifuzis. René sekve malaperis ĝis en loka gazeto aperis artikoleto mencianta, ke OGPU (la sekreta polica instanco de la registaro de Sovetunio en 1923-1934) estis senmaskiginta la eksterlandan spionon René Naville, kiu sekve estis pelita el la lando.

En tiu epoko mia praavino, la patrino de mia avino, jam estis la edzino de unu el la fondintoj de la Transkaŭkaza OGPU, nome Vasilij Vasiljeviĉ Safronov, persona gvardio de Lenino.

Ĉu Naville sukcesis rekrutigi duonfratinon? Ĉiel, li sukcesis persvadi ŝin aliĝi al la Esperanto-Asocio de Tifliso, kaj donacis al ŝi tiun kongresan insignon.”



TERMINARO

Alfabeta listo (43)

trinkmono: *donaco de kelkaj moneroj al kelner(in)o aŭ servist(in)o*

galeno: *mineralo el kuba, plumba sulfido (PbS), metalaspekta, blua-griza erco, pasinteco uzita por gajni arĝenton, aktuale uzata por fari detektilojn*

drakmo: *helena unuo de pezo (3,24 g) kaj samtempe nomo de arĝenta monero*

dukato: *iama, italdevena, ora monero*

dumpingo: *vendo de iu produkto je pli malalta prezo eksterlande ol enlande*

duro: *hispana arĝenta monero, valoranta kvin pesetojn*

aŭtarcio: *stato de lando, kiu volas limigi sin kiel eble plej al la konsumado de siaj propraj produktoj kaj ambicias iĝi ekonomie sendependa*

emisii: *krei kaj cirkuligi monon*

endosi: *meti sur la dorsa flanko de bilo,ambio aŭ ĉeko subskribon, per kiu oni cedas ĝin kaj ĝian valoron al citita persono aŭ al ties prezentonto*

floreno: *la unua mezepoka ormonero, stampita en Florenco*

forinto: *hungaria monunuo*

luidoro: *malnova, franca ormonero*

groŝo: *centono de aŭstria ŝilingo / dekonono de iama germane marko / tre malgranda monero*

guldeno: *malnova nederlanda monunuo*

kreditoro: *tiu persono al kiu oni ŝuldas ion*

financo: *monaj rimedoj, pri kiuj disponas iu ŝtato aŭ privatulo / stato de la en- kaj elspezoj*

giso: *alojo el fero kaj karbono, kun proporcio de du ĝis 6,6 % da karbono*

volframo: *metalo stanoblanka, tre densa kaj fajrimuna, uzata i.a. en ardolampoj*

tungsteno > volframo

komerca monero: *ora aŭ arĝenta monero, kiu estas komercata kontraŭ sia metalo kaj kies valoro estas negrava. Komercaj moneroj estas uzataj por malgrandskala spekulado pri oro aŭ arĝento aŭ kiel rimedo por certigi ŝparaĵojn en tempoj de politika aŭ ekonomia streĉiteco. Iuj komercaj valutoj estas eĉ listigataj en la borso*

elaĉeta mono: *ŝuldataj sumo aŭ valoraĵoj por elaĉeti ostaĝigitan personon*

Tiel kaj tial mono funkcias: la ombra flanko (2)

En la unua parto (*en la antaŭa numero!*) ni fokusis la reciprokan homan fidon kiel bazon de la funkciado de mono, sed tamen la sistemo baziĝas sur **du universalaj principoj**:

A) fido: nur per mono kiel perant(il)o, minimume du personoj, kiuj ajn ili estas, povas sukcese kunlabori pri ĉiu ekzistopova projekto.

B) konvertebleco: per mono kiel “alkemiisto” eblas transformi landon en fidon, rajton en sanon kaj perforton en konon.

Tiuj principoj ebligis kaj ebligas al milionoj da fremduloj efektive kunlabori en komerco kaj industrio. Tamen, tiuj okulmezure pozitivaj principoj montras ombran flankon. Se ĉio estas konvertebla kaj fido dependas de anonimaj moneroj kaj konkoj, enlandaj tradicioj kaj personaj rilatoj estas atencataj kaj anstataŭigataj per la severaj leĝoj de ofertado kaj mendado.

Homaj socioj kaj familioj tradicie estas fonditaj surbaze de la kredo je nocioj sen konkreta prezo, kiel honoro, fido, moralo kaj amo. Tiuj nocioj ne estas troveblaj en la merkato kaj ne estas vendeblaj aŭ aĉeteblaj. Certaj fenomenoj restas tabuaj, eĉ se la merkato ofertas bonegan prezon.

Ekde la komenco mono strebis rompi tiajn barierojn, kiel akvo, kiu tralikiĝas tra fendoj de baraĵoj. Tiuj provoj tute ne estis sensukcesaj, male.

La ekonomia historio de la homaro bedaŭrinde estas nur balanciĝo sur ŝnuro super abismo. Homoj fidis je mono por kunlabori kun aliuloj, sed samtempe ili timegas, ke tiu proceso subfosas homajn valorojn kaj privatajn rilatojn. Per unu mano oni konscie detruas la komunumajn barierojn kaj sufiĉe longe rezistas je la mekanismo de mono kaj komerco, per la alia mano oni konstruas aliajn barierojn por protekti la socion, la religion kaj la vivmedion kontraŭ la submeto per la libera merkato. Aktuale kutimas kredi, ke tiu merkato ĉiam triumfas kaj, ke barieroj konstruitaj de reĝoj, pastroj kaj socioj neniam sukcesos ŝanĝi malbonon en bonon. Tio estas naiva vidpunkto. Krueblaj militistoj, religiaj fanatikuloj kaj zorgoplenaj civitanoj oftege sukcesis puni profitekulojn kaj eĉ transformi la ekonomion.

Oni do ne simple konsideru la homan unuiĝon kiel nur ekonomian proceson...

Fontoj: Yuval Noah Harari: “Sapiens” kaj “Nexus”

Jen, du libroj kiuj meritegas ankaŭ esperantan tradukon!

EL LA GAZETARO

El “Belga Esperantisto”

El “Belga Esperantisto” marto-aprilo 1928 (n-roj 157-158)



antaŭa kovrilo



p.63



p.64

El “Belga Esperantisto” junio 1928 (n-ro 160)



antaŭa kovrilo 1928



malantaŭa kovrilo 1928

ENA tutkore dankas Marc Vanden Bempt, kiu trovis la du artikolojn en la arkivoj de Internacia Esperanto Arkivo (IEspA), vizitebla en Diest (Belgio). Vidu ankaŭ: “De ni por ni...” en ĉi numero

R E T P O Ŝ T O

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

03 07 2025 11:29

Saluton, kara Jozefo!

Kun sufiĉe da prokrasto, domaĝe (ĉu pro la varmondo en Belgio, ĉu pro mia alta aĝo aŭ ambaŭ?) kun pardonpeto mi sendos per W T la antaŭlastan numeron de jarkolekto 12. Provlegado ne vere urĝas, sed tio ankaŭ dependos de la kvanto de eraroj, evidente!

Laŭ neforgesebla kutimo mi jam kore antaŭdankas vin!!!

Amike kaj numismate,

Bert

05 07 2025 16:51

Kara Bert,

kun intereso mi legis interalie la artikolon pri Edvard Beneš, kies dekretoj forpelis milojn da hungaroj el sia naskotero. La artikolo prilumis alian flankon de ĉi tiu fama ŝtatviro; mi tute ne sciis pri lia pozitiva sinteno al Esperanto. Sed kiel la proverbo diras: "Por sperto kaj lerto ne sufiĉas eterne [Z], Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu [Z], Homo lernas la tutan vivon [Z], Plej saĝa maljunulo ne estas tro saĝa [Z], En ĉiu aĝo devas kreski la saĝo [Z], Bona majstro lernas ĝismorte" (el mia *Hungaraj kaj Esperantaj parolturnoj kaj proverboj*). Dankon!

Pri la vorto bimetalismo mi faris rimarkon: laŭ mi ni uzu la eblojn enajn en Eo, tial mi inversigis la plusendon al bimetalismo > dumetalismo.

Por la nomo de Antwerpen mi konas ankaŭ trian klarigon: aan 't werp, do ĉe la (homfarita) monteto, digo). Cetere mi ofte vidis la statuon antaŭ la urbodomo, sed neniam legis pri ĝia historio. Jen denove "Por sperto kaj lerto..."

Mi sendas la kontrollegaĵon per wettransfer.

Ripozigan someron mi deziras kun miaj amikaj salutoj kaj gratuloj!

Jozefo

06.07.2025 9:27

Kara Jozefo,

pri Benes, mi ne studis lian politikan karieron, sed mi ne miras, ke li ne estis tute "pura" viro. Escepte homoj kiel Willy Brandt, Gandhi, Mandela kaj kelkaj aliuloj, nur malmultaj politikistoj meritas

medalon el la vidpunkto de humaneco. Nu, mi estas kontenta, ke per numismatiko eblas montri fojefoje ankaŭ pli pozitivajn aspektojn, kvankam nur malofte...

Vi tamen sukcesis pliriĉigi mian vorttrezoron per viaj foje saĝaj, foje amuzaj parolturnoj kaj proverboj. Dankon!

Ankaŭ interesa estas tiu al mi ne konata klarigo pri la nomo Antwerpen, urbo kiun vi klare kelkfoje vizitis.

Fine ankoraŭ multan dankon pro via laboro favore al ENA!

*PS. El nia pasinta korespondado mi havas la impreson, ke vi konsideras la numismatikan terminaron kiel pli interesan aspekton de miaj numismatikaj projektoj. **Mi tial kuraĝas peti al vi iam verki enkondukon por la kompilaĵo kiun mi preparadas...ne pri mi mem kompreneble, sed pri la valoro de tia kolekto...***

Amike kaj numismate,

Bert

08.07.2025 8:44

Kara Bert,

fakte mi neniam vizitis Antwerpen, sed multo ligas min al ĉi tiu urbo. Interalie min tre interesas ĝia arĥitekturo, la urbodomo, De Grote Markt, ankaŭ la preĝejoj de la urbo estas belegaj. Mia amiko Petro de Smedt ofte vizitadis tie la bibliotekon. Tie oni eldonis mian unuan tradukon (Pinokjo).

Dankon por la honorigo skribi antaŭparolon por la numismatika terminaro. Kompreneble, volonte mi skribus ĝin, por tio estas multe pli kompetenta kaj inda homo: Walter Klag.

La hieraŭa ventoŝtormo kaŭzis ĉi tie multajn damaĝojn. Mi nun iras fari ordon en la korto kaj ĉirkaŭ la domo.

Belan someron!

Kun amikaj salutoj: Jozefo



07.07.2025 11:30

Kara Bernhard,

Tro longtempe inter ni estis silento, ĉar tial mi komencas demandi ĉu vi ankoraŭ bonfartas profesie kaj private. Mi fidas ke jes!

Vian profesion helpon mi tamen (denove!) bezonas por povi priskribi en la ENA-revuo memortabulon - el numismatika vidpunkto murplaketo - pri kiu mi jam trovis kelkajn informojn, sed nenion pri mezuroj, kiel longeco kaj larĝeco, metalo aŭ alojo, pezo ktp.

Kion mi jam scias:

-la tabulo troviĝis/-as? kontraŭ la fasado de la viena hotelo Hammerand, Florianigasse 8. Tiu hotelo ekiĝis en 1870 kaj anstataŭigis hotelon el la jaro 1696, nomita "Zum Goldenen Schlüssel". La zamenhofa familio tie loĝis en 1886 kaj 1895, Albert Schweizer en 1909, tiam Schlüsselgasse 6.

-La memortabulo estis forigita en 1958 kaj denove fiksita en 1959. La artisto-gravuristo estis iu F. Wacik.

- La tabulo estas menciata en "Monumente pri Esperanto" de Hugo Röllinger, p. 19 kiel Wien (Florianigasse 8) Z-tabulo 1924/59.

Ne urĝas via respondo, sed mi tamen esperas, ke vi povos trovi kelkajn mankantajn informojn, kiel ĉu la tabulo aktuale troviĝas sur la fasado aŭ en nia Muzeo...ktp.

Amike kaj numismate,

Bert

10.07.2025 12:56

Kara Bert,

multan dankon pro via mesaĝo kaj la interesaj demandoj.

Mi fartas bone kaj mi esperas, ke vi same bone fartas kaj pasigas agrablan someron.

Alkroĉite mi sendas al vi informojn pri la tabulo, kiujn mia kolemino en la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Susanne Teutsch, ege zorge kaj diligente kompilis.

Amikajn salutojn kaj bondezirojn,

Bernhard

Mag. Bernhard Tuidar

Teamleiter

Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.07.2025 4:21

Dankon. Mi legis iomete. Mi ĝuos legi plu poste.

Ĉion bonan.

trio@esperanto.org <=> 三人 <=> <http://trio.sen.limo/>

#Esperanto , The International Language! What's that? <http://Esperanto.Org/>

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.07.2025 18:39

Dankegon pro la sendo! Ĝi certe estos mirinda, kiel kutime! Dankon pro via grandioza laboro, cele al pliriĉigo de la Esperanto-historio.

Laŭdojn senfinajn!

Via Elda

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

18.07.2025 18:50

Dankon kaj la saman por vi!

Maria Niemyjska

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.05.2022 16:38

Estimata S-ro Holmlund,

Laŭdire la karmemora UEA-delegito pri juveloj Snarberg ne nur estis oraĵisto, sed ankaŭ juvelisto kiu kreis almenaŭ unu esperantan medalon. Mian scivolon pri tio kaŭzas la projekto pri la baldaŭa eldono de la "Unua Katalogo de Esperantaj Numismatikaĵoj".

Pri tiu al mi nekonata medalo kaj aliaj svedaj esperantaj moneroj kaj medaloj ĝis hodiaŭ mi petas helpon por trovi fotojn kaj informojn. En aldonata revunumero de ENA en la rubriko "Moneroj & Medaloj" vi vidos kiajn informojn ni bezonas por plejeble kompleta priskribo.

Mi kore antaŭdankas vin pro via kunlaboro!

Altestime,

Mag.Fil Bert Boon

21.05.2022 10:20

Saluton,

Venis aldonita helpopeto pri via patro (ĉu ne?) Jack Snarberg. Ĉu vi bonvolus respondi al Bert Boon (informe al ni aliaj)?

Amike,

Ann-Louise Åkerlund

22.07.2025 11:37

Saluton Bert,

Mi estas la filino de Jack Snarberg.

Unue mi pardonpetas pri tro malfrua respondo je via helpopeto, kiu mi hazarde trovis nun. Kiam vi sendis en 2022 mia patrino ĵus forpasis kaj iel via peto ne estis zorgita de mi. Denove, sinceran pardonon!

Mi ne scias ĉu via demando ankoraŭ aktualas sed bedaŭrinde mi ne povas helpi vin.

Fine, dankon pro via belaj vortoj pri mia patro!

Amikajn salutojn,

Keiko Snarberg

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

22.07.2025 19:28

Kara Bert, dankon pro la sendado de la aktuala ENA-eldono.

Kore salutas Andreas

Andreas Diemel

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.07.2025 20:01

Salutojn, miaj karaj!

Pardonu mian ĝenon, sed urĝe, nome por morgaŭ, mi bezonas etetan resumon pri la monero *Unu stelo*, tio por la artikolo de IL Postalista.

Ĉu mi rajtas elĉerpi ion el via EN? temas nur pri kelkaj linioj. Mi rigardis en retejo kaj ankaŭ en la *Esperanto-mono* de Jankowski, sed mi ne sukcesis, ĉar tie troviĝas tro longa priskribaĵo de la tuta afero. Mi ne sukcesas trovi la prian artikolon faritan de vi en via EN - ĉu vi scias la koncernan numeron en kiu vi priparolis pri stelo? Koran dankon pro la helpo, rapidan brakumon al ambaŭ, Elda k Pino

27.07.2025 13:27

Salutojn ankaŭ al vi,

En jarkolekto tri estas priskriboj. Tekston de nur kelkaj linioj mi bedaŭrinde ne havas. Nur ĉe Jankowski vi povas elekti kelkajn liniojn el lia artikolo...

Amike,

Bert kaj Vivi

27.07.2025 13:45

Koregan dankon. Mi rigardis la artikolon! Ĝi certe min helpos.

Amike, Elda

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

27.07.2025 17:28

Kara Bert!

Dankon pro tiu numero de la ENA-revuo.

Somere salutas Walter Klag

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.07.2025 10:09

Kara Bert!

Jen portempa pli granda interesiĝo pri la STELO – eble pro la lasta numero de ENA-revuo?

[https://pageviews.wmcloud.org/?project=eo.wikipedia.org&platform=all-access&agent=user&redirects=0&range=latest-60&pages=Julia_Isbr%C3%BCcker|Ren%C3%A9_de_Saussure|Stelo_\(monunuo\)](https://pageviews.wmcloud.org/?project=eo.wikipedia.org&platform=all-access&agent=user&redirects=0&range=latest-60&pages=Julia_Isbr%C3%BCcker|Ren%C3%A9_de_Saussure|Stelo_(monunuo))

Amike salutas Walter Klag

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.07.2025 10:49

Saluton Bert,

mi nuntempe katalogadas “objektojn” el la eksa Fonduso Vanbiervliet por IEspA. Farante mi trovis kelkajn aĵojn, eble interesajn por ENA.

Jen kelkaj fotoj.

- Belga Ligo Esperantista: 28x30 mm, en malpeza speco de metalo (ĉu stalo?) en skatoleto je 15x5 cm.

- Ronda stelo 5,2 mm sen iu indiko; metala
- UMEA 8,3x9 cm; ĉu bakita argilo?
- Eble samspeca kiel la metalaĵo el Pasvalys, sed tute ne medalo (13,5x13 cm)
- Debrouwere estis esperantista, sed la medalo ne estas esperanta. Ĉu kupra? (50 cm diametro).

Ĉio nun definitive bone konservota ĉe IEspA.

Ĝis,

Marc Vanden Bempt

30.07.2025 11:01

Marc kaj Bert,

En la aldonitaj dokumentoj (elkolekto de artikolaro en la FV) troviĝas kompiligantaj informoj pri la Debrouwere-medalo.

Roland Rotsaert

30.07.2025 12:28

En la precigo de la fonduso mi dume trovis priskribon verkitan de Roland.

- Medalo kun pinglo kaj ŝnuro. Teksto: BELGA LIGO ESPERANTISTA |UNUECO DONAS FORTECON. Estas bildo de stelo, mondglobo (kun nomo de kelkaj kontinentoj) kaj ŝildo kun leono. La dorso estas glata, sen iu mencio.

La unua bildo estas fotita, la dua skanita. Origino nekonata. La medalo estis fiksita al menukarto de la festeno okaze de la ora jubileo

(13.2.1955) de Reĝa Belga Ligo Esperantista en la Internacia Marista Domo en Antwerpen kaj verŝajne unuafoje disdonita je tiu okazo. Raporto en Belga Esperantisto 330, februaro 1955.

- Ronda plateto kun stelo kaj radioj. Estas neniue indiko pri Esperanto, sed ĉar ĝi troviĝas en esperanta kolekto, supozeble estas provo de esperanta medalo.

- Memoraĵo de Renkontiĝo de Baltaj Medicinistoj en Pasvalys (Litovio), organizita en 1989 de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) kaj LEA (Litova Esperanto-Asocio). Maldekstre: kvinpinta stelo super terglobo kun serpento (medicinista simbolo). Sub la jarindiko: unu el simboloj de Litovio, tiel nomataj fostoj (kolonoj) de Gediminas.

Gediminas estis grandduko de Litovio. En la litova lingvo tiu simbolo nomiĝas Gedimino stulpai. (Informoj parte el revuo de Esperanto Numismatika Asocio, 2018-4, p. 4)

- Memoraĵo de la litova urbo Pasvalys, verŝajne disdonita al la partoprenantoj de la 1989a Renkontiĝo de Baltaj Medicinistoj (ID 0011).

- Medalo de la nordfranca urbeto Croix, transdonita al belga esperantisto Gerard Debrouwere el najbara urbo Kortrijk je 25 marto 1973, okaze de Esperanto-kongreso kaj inaŭguro de Zamenhofstrato. La medalo troviĝas en ruĝa skatoleteto, 75x75x30 mm. Foto pri la transdono aperis en la gazeto 'La Voix du Nord', 3 aprilo 1973. Sur la foto estas Gerard Debrouwere (1), Lucien Giloteaux (2, esperantisto el Croix) kaj Georgette Wybouw (3, el Aartrijke, Belgio, edzino de Manuel Alberto).

Marc

30.07.2025 14:40

Saluton ambaŭ!

Tutkore mi dankas vin pro la neatendita cunameto, tre taŭga por nova numero!

Tio koncernas unuavice la medalon kaj la artikolojn pri Gerard Debrouwere kaj aliflanke la "plaketon kun stelo kaj radioj". Ĉu vi eble povas aldoni la mezurojn?

Amike,

Bert



31.07.2025 11:20

Kara Maja Gorova!

Multan dankon! Ĉu mi daŭrigu sendi la ENA-revuon?

Bert

31.07.2025 15:58

Dankegon!

Via revuo estas interesa kaj se ne estas problemo por vi, jes vi daŭrigu sendi ĝin. Ankoraŭfoje dankon!

Bogomil Zhivkov kaj Maja Gorova

31.07.2025 19:56

Ne dankinde, mi danku vin kaj vian edzon!

Vi kaj li kune ekde la nova numero de oktobro estos abonantoj kun laŭorda numero 172, la nombro de individuaj membroj el preskaŭ kvindek tutmondaj landoj. Gratulojn kaj koran dankon!

Eble vi jam scias, ke en la aŭgusta numero de "Literatura Foiro" aperis artikoleto verkita (sed sen bildoj!) de Elena Popova kun kiel titolo "Antaŭ pentraĵoj de Bogomil Zhivkov".

Mi supozas kaj esperas, ke vi informos min, se via edzo aŭ alia bulgara artisto-medalisto kreus novan esperantan medalon, ĉu ne? Multan antaŭdankon!

Amike kaj numismate,

Bert



07.09.2025 11:25

Kara Elda!

Marc Vanden Bempt sendis al mi interesan, longan tekston "Esperantismo en Friulo" (Giacomo Martinez). En ĝi mi trovis nigra-blankan bildon (sur paĝo 77) de medalo kun jena klarigo: "La 8an de septembro 1974, la Komunumo kaj la Turisma Entrepreno de Linjana Orsablo kune kun la Sporta Klubo "Porta Villalto" de Udino organizis la Internacian longan Marŝon "L.Zamenhof". Al la partoprenantoj, kiuj finis la iron en la maksimuma fruo oni aljuĝis artan medalionon".

La medalo ne estas kolora kaj eble tial mi ne sukcesas legi tion kio estas antaŭ la jaro "1973".

Eble vi konas iun el tiu regiono en la nordo por peti informojn pri kolora bildo kaj mezuroj, ĉu ne?

Mi jam antaŭdankas vin tutkore!

Amike kaj numismate,

Bert



07.09.2025 17:08

Kara S-ro Giacomino Martinez!

Mi sendas al vi la suban mesaĝon, ricevitan de prof. Albert Boon, el Belgio, fondinto de Esperanto-Numismatika Asocio kaj redaktanto de la revuo Esperanto Numismatiko.

Li legis vian libron kaj bezonas de vi kelkajn detalojn pri la medalo eldonita okaze de la Internacia Longa Marŝo *L. Zamenhof*, en 1974.

Mi aldonas la lastan numeron de E-Numismatiko, kiu estas grava fonto de informoj pri esperantaĵoj.

Koregan dankon pro via ĝentila kunlaboro,

amike,

Elda

14.09.2025 20:06

Est. Prof.ro BOON, bedaŭrinde mi estis en Sicilio kiam S.rino Doerfler sendis al mi vian mesaĝon. Mi revenis hieraŭ vespere kaj nur hodiaŭ mi povis legi la retpoŝton. Pri la medalo, mi komunikas la jenajn sciigojn:

Koloro: kvazaŭarĝento

Rubando: verda

Diametro: centimetroj 6

Pezo: gramoj 68

Teksto fronto medalo, runde: Comune e Azienda Autonoma di Soggiorno – Komunumo kaj Aŭtoma Turisma Entrepreno; sub la blazono: Lignano Sabbiadoro – Linjano Orsabra

Teksto dorso de medalo: Marcialonga Internazionale “L. Zamenhof” 8 settembre 1974 – Internacia Longa marŝo “L. Zamenhof” 8 septembro 1974.

Mi deziras precizigi, ke mi havas la medalon sed mi ne partoprenis en la longa marŝo.

Mi esperas, ke mi helpis vin iamaniere.

Kore.

Giacomino Martinez

15.09.2025 0:58

Tre estimata samideano S-ro Martinez,

Unuavice mi volas tutkore danki vin kaj same Eldan pro la tre gravaj kaj kompletaj informoj. Mi aldonas la lastan kaj senpagan numeron de nia revuo, por montri kiel ni priskribas la medalojn.

*Eble vi povus sendi al mi **kolorajn kopiojn** de la averso kaj reverso de la medalo, mi petas? Se tio kaŭzus kostojn al vi, bonvolu ankaŭ sendi la nomon de via banko kaj vian kontonumeron...*

Mi anticipe dankas kaj salutas vin,

Bert Boon

15.09.2025 14:25

Prof. Boon, nenion vi devos al mi!

Kore. Giacomino Martinez

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

ANONCOJ

&

EVENTOJ

“Monero” kaj monero



1. Ni opinias, ke la Esperanto-asocio kaj la “Monero-entrepreno havas multajn komunajn trajtojn. Esperanto celas disvatigi novfaritan lingvon, por ebligi al la homaro uzi komunan lingvon. Neniu havas avantaĝojn, kiel nacilingvanoj, kies lingvon ĉiuj devas kompreni kaj uzi. Ĉiuj devas lerni ĝin ekde la fundamentaj gramatiko kaj vorttrezoro. La esperantista komunumo estas senlime diversa kaj gastema. Tia estas ankaŭ la komunumo de “Monero”.

Esperantistoj estas pacifistoj, sendube. Por ili militoj estas “fruktoj” de naciaj ŝtatoj. Monero-anoj vidas saman rilaton inter nacioj kaj monistemoj. Ili ŝajnas esti futura minaco. Ĉu ili provos reguligi bitmonon...?

Bonŝance ekzistas nun pacema kaj sendependa rimedo por rezisti eventualajn minacojn per taŭga monunuoj: “Monero”.

2. Kelkaj informoj pri Monero:

La kriptomono “Monero” ne estas kopio de bitmono, ĝi havas tute malsaman kodon. Eble vi ne scias tion, sed bitmono estas spurebla de ĉiuj (inkluzive de registaroj, ŝtelistoj kaj korporacioj).

Monero estas kriptomono, kiu tute anonimas (vizitu getmonero.org por klarigoj).

Kiel rilatas Monero al Esperanto? Ni pensas, ke ni havas iom de la spirito de Esperanto: ĉiuj ŝajnas uzi la regantan kriptomonon (bitmonon), sed ni uzas la malgrandan, privatan kriptomonon. Tiel Monero estas alternativo por bitmono, kiel Esperanto estas alternativo por la angla lingvo.

Multaj homoj pensas, ke bitmono anonimas. Ĉu vere? Tio certe ne veras: <http://www.bitcoinisnotanonymous.com/>

a. Ĉiuj transakcioj publikas: blockchain.info

b. Kompanioj uzas tiun informon por spuri bitmonon: (<http://coinalytics.co/>, <http://www.quantabytes.com/>, <https://chainalysis.com/>, ...)

c. Se tia informo kombiniĝas kun dosieroj de konsumantoj ... oni povas sekvi monon en la reto kaj aldoni identecojn al adresoj (blockchainalliance.org)

d. Ĉu sufiĉas, ke neniu en la reto scias mian bitmonan adreson?


Ne, kiam vi interagis per interŝanĝoj aŭ pagaj provizantoj, oni povas ligi viajn dosierojn kun via bitmona adreso.

Se mi scius vian konton, via konto ankaŭ ne plu estus anonima, ĉu ne?

Prave, sed tio nur veras por bitmono. “Monero” protektas kontraŭ tio per novaj konceptoj: “ringsubskriboj” kaj “sekretadresoj”.

Monero kaj Esperanto komenciĝis malgrande, sed ambaŭ povas kreski

Rezultoj de vendado en aŭkcioj de la stelo-medaloj (i.a. kreitaj) de Walter Klag



Trezoro retrovita en forbrulinta romia vilao



Arkeologoj malkovris en Rumanio eksterordinaran trezoron, konsistantan el pli ol 40 moneroj kaj diversaj juveloj, dum multaj jarcentoj konservitaj en detruita domo en la greka urbo Histrio. Tiu urbo troviĝas ĉe la marbordo de la Nigra Maro kaj origine ĝi estis greka kolonio, sekve grava romia kolonio.

Probable la vilao pereis inter la dua kaj la mezo de la tria jarcento. Ĝi vere estas ekzemplo de ege riĉa kaj luksa vilao kun plankoj faritaj per kalkoŝtono kaj muroj kun pentritaj stukaĵaj tavoloj.

La objektoj probable estis konservitaj en ligna kesto. Pro la altegaj temperaturoj dum la brulado la enhavo kunfandiĝis kaj estis retrovita en la formo de la malaperinta kesto.

La retrovita trezoro, kune kun aliaj objektoj, kiel enskribaĵoj, ceramiko kaj bronzaj objektoj rakontas la historion de tiama ege riĉa familio. Gravegaj estas do la informoj pri la vivo de riĉuloj tiutempe.



Verkis: Rens van Maasakker

Tradukis: Bert

Fonto: Nacia Historia Muzeo Rumanio

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojefoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 172 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dis en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be